# LA PACDEFENDANTO

N-o.27. NEREGULA CIRKULERO POR ČEȞOSLOVAKIO Marto 1954.

## ČE LA VERDA TABLO SEN REZULTO

La vortoj de Stalin montriĝis veraj. Sufiče longan tempon kunsidis la kvar potenculoj en konferenco de Berlino kaj atingis nenian rezulton koncerne la forigo de la strečita situacio en Eŭropo, koncerna la unuiĝo de dissplitigita Germanio, nek sukcesis atingi unuecan opinion pri la packontrakto kun Aŭstrio. Fakto estas, kiel diris Stalin: La paco estos garantiata, kiam la popoloj mem prenos ĝian defendon en siajn manojn. Se oni decidus aranĝi similan konferencon en kiu rajtus pri tiuj či problemoj decidi reprezentantoj de čiuj nacioj - esperantistoj -, ni povas esti certaj, ke la konferenco daŭrus ne pli ol du tagojn kaj čiuj problemoj, kiujn la grandaj gvidantoj ne kapablis solvi, ili solvus en la intereso de siaj popoloj rapide kaj bone. Kaj se la popoloj mem en libera vočdonado povus esprimi sian volon, certe ankaŭ tiuj ne decidus kontraŭ siaj propraj interesoj. Če la altaj diplomatoj estas vere malfacila ion decidi, čar la interesoj de ambaŭ partoj estas diversaj. Same diversaj estas la PACOJ, kiel la tiom multe pridiskutitaj germanaj liberaj balotoj.

Post la longa berlina diskuto šajnas, ke la internacia situacio fariĝis ankoraŭ pli serioza ol ĝi estis iam ajn antaŭe. La tiel nomata "Malvarma Milito" pli akriĝas kaj ne estas neebla, ke ĝi finfine rezultos en milito efektivapli kruela kaj terura ol estis la pasintaj, en milito, kiu eč povus pereigi grandan parton aŭ partojn de la civilizita mondo.

Fakto estas, ke la militinstigantoj absolute ne povas kalkuli je ia sukceso atingebla pere de ordinaraj soldatoj. Jam Koreio montris al ni la pasivecon inter la soldatoj kaj pro tio oni devas serči alian batalmetodon, al kiu ne necesos granda nombro da soldatoj, sed nur minimuma nombro da homaj-diabloj, kiuj per la plej modernaj pereigiloj detruus la "malamikon" kune kun sia kulturo kaj naturo. Mi kredas, ke en okazo de normala /kiel ĝis nun/ milito, abundus la libervolaj militkaptitoj ambaŭflanke. Tio estus ankaŭ la sola rimedo de malamikoj de milito por rifuzi sian partoprenon. Simila stato jam montriĝis en Koreio kaj ni kredu, ke en eŭropa milito ĝi ankoraŭ pli ampleksiĝus. Tio estas la kialo, pro kiu la militinstigantoj devas serči, kaj jam preparas, novan metodon.

La radiostacio "Libera Eŭropo" čiu tage ripetas siajn promesojn pri liberigo de malantaŭ la "Fera kurteno" suferantaj kaj subpremataj popoloj". En ĝiaj relacioj oni promesas veran demokracion, liberecon, egalrajtecon kaj čion eblan kaj neeblan. Sed la atenta aŭskultanto devas vole nevole al si starigi la demandon: Kaj kial ili jam nun informas nin pri siaj preparoj de la Atom-milito? Pro kio ili liveras al Germanio Atom-kanonojn kaj al Anglio Atombombojn ktp.? Ču per tiuj teruraj pereigaj armiloj ili eble volas prepari por ni la Paradizon sur tiu či tero? Tion ja povas kredi certe nur iaj stultuloj.

La situacio estas vere tre serioza kaj la pacdefendantoj devas sin firme koncentrigi por esti kapablaj defendi la pacon kontraŭ la konstantaj militminacoj.

La nura pacifismo jam ne sufičas por kontraŭbatali la modernajn hompereig-metodojn. Jam ne sufičas la losungo adresata al la larĝaj popolamasoj: "FOR LA BATAL-

ILOJN!",kiun malgraŭ ĉio ni devas daŭre propagandi.Sed necesas rigardi eventualan novan militon ne kiel militon,sed kiel mondkatastrofon,kiun ne decidos aŭ aranĝos soldatamasoj,armeoj, sed kiun kapablos aranĝi unuopaj homaj diabloj. Imagu,kion estus kapablaj fari la pacdefendantoj dum la atom-eksplodo en Hirošima kaj Nagasaki,eĉ se da ili estus milionoj dum la tiama tempo en Japanio ? Kaj kion estus povintaj fari la amerikanaj pacdefendantoj por malebligi al nur kelkaj pilotoj-frenezuloj,kiuj veturigis kaj faligis tiajn diablajn bombojn kontraŭ la japana popolo. kiam ili eĉ ne sciis kiam kaj el kiu loko tiuj en Ameriko startis por efektivigi tian teruran agon ?

Jen faktoj,kiuj devigu nin la aferon serioze pripensi, por esti kapablaj kontraŭbatali ankaŭ tiun ĉi gravan minacon kontraŭ la homaro. Mi opinias,ke estas absolute necesa,ke la pacdefendantoj akiru antaŭ ĉio efikan kontrolon de la uran-minejoj kaj atomfabrikejoj kaj havigu al si la eblecon decidi por kiaj celoj estu tiuj produktoj uzotaj.

Se la homoj ne sukcesos atingi tian kontrolon,ŝajnas esti la mondkatastrofo daŭre minacanta.

BURDA Rudolf

## DOMAĜO,KE NI NE POVIS PARTOPRENI

De la 1-7.de januaro okazis en urbo Perth la 9.Aŭstralia Esperanto Kongreso,kiu devis esti certe tre interesa kaj sukces-plena.Ni ankoraŭ ne scias la nombron de la partoprenintoj,sed jam la programo kiun ni legis en la oficiala organo de AEA,LA RONDO,nin multe informas.

Tuj ĉe la komenco okazis pres-konferenco en Shafesbury hotelo kiun sekvis interkonatiĝa vespero en McNess halo.S-ano. Edwin Moore esp-lingve predikis en preĝejo de St.Bartholomews. Ŝercpoemojn de fama franca s-ano. R. Schwartz prezentis H.Koppel. En Boans Fashion salono estis aranĝita kongresa Ekspozicio kiun sekvis akcepto de la kongresanoj ĉe la urbestro. Okazis kongresa seminario de interesaj prelegoj, fakkunsidoj de UEA,SAT,instruistoj ktp.Lastatempe nia movado en Aŭstralio rapide kreskas dank' al kelkaj fervoraj gesamideanoj.

## PUBLIKA LETERO AL LA MONDA PACKONSILANTARO

En la nomo de MEM-anoj kaj kelkaj pluaj porpacaj esperantistaj organizoj estis sendita letero al la estraro de la Monda Packonsilantaro,proponinta en la senco de ĝiaj lastaj rezolucioj kaj alvokoj siajn peresperantajn servojn kaj kunlaboron en la organizado por defendi la pacon.La atendatan respondon ni sciigos al niaj legantoj.

## ALIĜU JAM NUN !

por partopreni la Someran Esperanto Kolegion okazintan de 25. julio ĝis la 7.aŭgusto 1954 en urbo DOKSY u Máchova jezera. La tiujara programo procedos laŭ progresema vidpunkto sub la protekto de la distrikta packomitato. DOKSY fariĝu la renkontiĝo de ĉiuj progresemaj esperantistoj kaj pacdefendantoj. Alvenu ! Vi multe lernos kaj bone refreŝigos vian sanon kaj energion por via plua agado. Detalajn informojn petu ĉe : K-do.Václav ŠPŮR, ředitel Čsl.Státní Banky-pobočka DOKSY u Mách.jezera.

## " P A C O " ofic.organo de MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO /MEM/

Ni atentigas la abonantojn,ke ni devis ŝanĝi la prezon de 8 al 10.-Kčs por povi kovri la poŝtafrankon.Novajn abonantojn ni ne plu povas akcepti,escepte de kolektivoj.Bonvolu noti,ke por ČSR funkcias kiel MEM-peranto de nun k-do.František LIČKA, Březí č.12 OSTRAVA-Zábřeh,kiu zorgos pri la distribuado de "PACO" kaj donas necesajn informojn pri "MEM".
LA PACDEFENDANTO estas ankoraŭ abonebla ĉe nia redakcio kontraŭ pago de 10.-Kčs jarabono por 1954 Por eksterlando kontraŭ sendo de 14 internaciaj resp.kuponoj aŭ samvalora esperantaĵo.

## HAARLEM INVITAS !

La 39.UEA-kongreso okazos tie de 31.julio ĝis 7.aŭgusto 1954.Laŭ raporto en "HEROLDO"jam nun aliĝis pli ol 1.000 gesamideanoj el 23 landoj.Estus dezirinda ankaŭ kunlaboro por la mondpaco.

CEJKOV p.JASTRABIE, ankaŭ ĉi tie ni vigle laboras. Dum la Kristnasko festo kaj ankaŭ jam antaŭe nia ĥoro sukcese kantis Esperantlingve en la loka preĝejo. Ni nun provos ankoraŭ aranĝi aliajn entreprenojn.

DĚČÍN, ni gratulas al la esperantista paro, k-dino Vanda Hartová kaj d-ro.inĝ.Jiří Beneš okaze de ilia edziĝfesto, okazinta la 30.de januaro 1954.

DOKSY, sub la protekto de la distrikta packomitato ree okazos de la 25.julio ĝis 7.aŭgusto 1954 la tradicia SOMERA ESPERANTO KOLEGIO en Doksy. K-do.Špůr, direktoro de la loka ŝtata ŝparkaso komencos en marto senpagan Esper. kurson por la oficistoj de tiu ĉi entrepreno kaj intencas fondi rondeton en la sindikata organizo. La komitato de la Somera Esp. Kolegio decidis efike kunlabori kun la Mondpaca Esperantista Movado kaj starigi sian programon sur la bazo de la defendo de la tutmonda paco.

LANŠKROUN, la 26.de marto prelegos k-do.J.Werner pri "Ĉeĥaj Esperanto-poetoj". Kurso por komencantoj funkcias, sed la nombron la raportinto forgesis anonci.

HEŘMANEČ p.Vel.Lhota, fondiĝis nova Esp-rondeto kaj funkcias kurso, kiun partoprenas 4 instruistoj kaj 20 gelernantoj el meza lernejo. La grupo petas alsendon de propaganda materialo. Adreso: K-do.Pavel SITTAUER, instruisto, Heřmaneč pošta VELKÁ LHOTA, okres Dačice, Ĉeĥoslovakio.

PLZEŇ, kurso kun 6 lernantoj finiĝis. 2 el ili restis fidelaj. Nova kurso kun 20 gelernantoj komenciĝos la 10.de marto en la klubejo, Sedláčkova 39. La 17.de februaro prelegis kun akompano de lumbildoj nia nederl.k-do. Cor de Waart pri la lata inundo en Nederlando. Lunde la 22.de marto de 19.horo okazos prelego pri J.A. Komenský kun lumbildoj de k-do. Jos.Pech. La vesperon partoprenos k-do.Fr.Lička, prez.de la uzina klubo de ferfabrikejoj en OSTRAVA -Vitkovice, kiu parolos pri la E-movado en sia regiono.

KOPŘIVNICE, laŭ informo de nia k-do.Rud.Zanáška, tiu fine sukcesis ricevi konsenton de la uzina klubo "TATRA" por eldonado de la cirkulero "LA PACDEFENDANTO". En la redakcia rondo ankaŭ kunlaboros k-dino Marta Hrčková. La rondeto verŝajne komencos la eldonadon kaj distribuadon en aprilo.

BRNO, la tramista Esperantoklubo kunvenas unufoje semajne, nome: la 1,8,13,19.kaj 25 de februaro la 3,9,15,22.kaj 27.de marto ĉiam post la 17.horo en la klubejo.

HULÍN, post disdono de flugfolioj en ĉeĥa lingvo "Kio estas Esperanto?" en la metaluzino de Hulín aliĝis ĉe nia k-do. Doležal jam 15 lernontoj kaj multaj ankoraŭ montras viglan intereson. Por akiri ankoraŭ pluajn adeptojn, k-do.Doležal aranĝis en la uzino murekspozicion kun alloga materialo kaj publikas interesajn raporojn el "PACO" la oficiala organo de "MEM" en la uzina gazeto "Hulínský Kovák".

OSTRAVA, la 3.de februaro komenciĝis nova kurso por komencantoj en la uzina klubo de la feruzinoj en Vitkovice. La kurso funkcias ĉiu merkrede de la 15-16 horo Santage post ĝi estas kurso por progresintoj. La 28.de marto prelegos kun akompano de lumbildoj k-do.Jos.Pech el Plzeň pri Jan A. Komenský/Komenius/ kaj lia vivo antaŭ 300 jaroj en Nederlando.

MARTIN, post translokiĝo de k-do. Hoffmann al tiu urbo, la lokaj esp-istoj kunvenadas regule ĉiusemajne.

SVIT/slovakio/ la rondeto daŭrigas siajn regulajn kunvenojn. K-dino Julia Kaczerová promesis sendi por nia venonta n-o. interesan raporton pri la loka movado.

TANVALD, koncerne nian laboron, ni ne povas esti tro kontentaj. Mankas la regula vizitado de kunvenoj kaŭze de diversaj laborterminoj en la okupo de niaj membroj kaj ne konvena ejo. Koncerne kunlaboro kun la "Kleriga Klubo" ni povas esti tre kontentaj, ĉar laŭ nia opinio, ni eĉ ne meritas ĝian intereson pri ni. Tamen ni esperas, ke nia situacio ŝanĝos.

Daŭrigo sur paĝo 4.

## NIA ESPERANTO MOVADO EN ČSR.

PRAKOVCE/Slovakio/sub la gvido de k-do.Pindroch kaj Kostolný daŭrigas la instruado en la nova grupo de la loka mašinfabrikejo.La grupo eldonadas regule tre interesan cirkuleron.

SUŠICE ,tre vigle en tiu urbo laboras nia k-do.Waldmann kun sia malgranda kolektivo.Baldaŭ fondiĝos nova rondeto en la tiea konata alumetfabrikejo"SOLO".

PARDUBICE,fine de januaro nia rondeto translokiĝis al uzina klubo RPA/elektra entrepreno/kies uzina konsilantaro nin akceptis preskaŭ entusiasme.En nia pasinta posteno /če uzina klubo de fervojistoj/en stacidomo,renkontiĝis nia laboro kun granda malfavoro kaj malamikeco,precipe dum la lastaj 2 jaroj.

Nia nova protektanto favoras Esperanton kaj disponigas al ni ĉiu ĵaŭde belege kaj moderne meblitan klubejon.En la uzina gazeto STOŽÁR aperis jam pasintjare artikolo pri Esperanto kaj de nun ĝi regule publikas raportojn pri nia movado.Ni havas al dispono vitrokeston en la halo de la uzino kie ni ekspozicias nian propagandan materialon.Ĉinaj pacafišoj kun poresperantaj varbtekstoj troviĝas sur la muroj en diversaj lokoj de la uzino.Nova kurso komenciĝos fine de marto.La nova klubejo troviĝas en Sokolovna na Olšinkách,kie ni kunvenas ĉiu ĵaŭde de 19.30 - 21.30 horo.

## MUNICIO POR NIA BATALO

K-do.Mlýnek-Ostrava-Zábř...3.-Kčs
K-do.Zmeškal-Praha........ 3.-"
K-do.Dušánek-Chrudím...... 6.-"
K-do.Št.Horák-Gelnica..... 3.-"
K-do.Faltejsek-Třebechovice5.-"
K-do.Staňura-Ostrava...... 5.-"
K-do.A.Baláš-Brno......... 2.-"
K-do.Fr.Hába-Vizovice.....10.-"
K-do.A.Trombala-Bohumín...10.-"
K-do.Er.Gold-Karviná......10.-"
K-do.Kubasiak-Karviná..... 5.-"
K-do.D.Zubek-Karviná...... 5.-"
K-do.J.Kawulok-Karviná.... 5.-"
K-do.Pastuszek-Karviná....10.-"
K-do.Ed.Peszat-Karviná.... 5.-"
K-do.Tomiczek-Karviná.....10.-"
K-do.A.Odehnal-Karviná.... 5.-"
K-do.E.Špaček-Ostrava-zábř.6.-"
K-do.J.Windisch-Brno...... 5.-"
K-do.Šolle-Žandov u Č.Lípy .10.-Kčs
K-do.J.Mazánek-Ostrava......10.-"
K-do.T.Kilián-Třebič........ 2.-"
K-do.B.Munzar-Hořice v pkrk. 5.-"
K-do.J.Raška-Vel.Bystřice... 2.-"
K-dino.Faltýnková-V.Meziřičí10.-"
k-do.K.Kraft-Županovice.....15.-"
K-do.J.Rezner-Brno.......... 5.-"
K-do.A.Csáder-Bratislava.... 5.-"
K-do.J.Stankuš-Orlová....... 6.-"
K-do.R.Skalický-Vitkovice... 4.-"
K-do.Wagner-Plzeň........... 5.-"
K-dino.Honsová-Gottwaldov....5.-"
K-do.B.Pagáč-Trenčín........ 8.-"
K-do.J.Hopf-Nové Sedlo......10.-"
K-do.Heikenwälder-Prostějov. 5.-"
K-do.pastro Macek-Mikulov... 3.-"
K-do.Vl.Kočvara-Opava....... 5.-"
K-do.Pavlacký-Veselí n/M.... 5.-"
K-dino.Kaplerová-Brno....... 6.-"
K-do.Vl.Sládeček-Karviná.... 3.-"

Jen fakto,kiu klare montras la persistovolon de niaj gekamaradoj Akceptu la plejkoran dankon de la administracio kaj redakcio!

## ATENTIGO

Al jenaj adresoj ni ĉesas ekspedi LA PACDEFENDANTON,ĉar la pošto al ni ĉion revenigas:

K-do.Gejsa Adam,Penzion I,505 Svit
K-do.Švec Pavel,Slobodáron III/29, Dubnica n/Váhom.
K-do.Rakyta Josef,Pos.Spr.25/D 1, Dubnica n/Váhom.
K-do.Vyžvalda Jaroslav,Liduce 46, pošta Buštěhrad.
K-dino.Horáková Anna,Penzion II. 203,Svit.
K-do.Mareček Antonín,Cihelna č.102 Praha III.
K-do.Toufar Jan,Táborská č.78, Brno-Julianov.
K-do.Chýlek Zdeněk,Pos.spr.77/K, Valašské Meziříčí.
K-do.Skoupí Frant.P.S.42/I,Kroměříž.
K-do.Křenek Jiří,Tomášská 12,Praha
K-do.Ryba Frant.Bodlice 267 Blatná
K-do.Sychra Bedř.Ul.5.května 231, Doksy.
K-do.Gottfried Jar.Tiché nám.č.8, Třebič-Zámostí.
K-do.Plachý Miroslav.VPŠS,Nový Bor
K-do.Vaněček Vladimír,úř.KVP,n.p. Křížova 24,Karlovy Vary.

Ni petas atentigi tiujn ĉi gekamaradojn,ke ili bonvolu sendi sian novan adreson,se ili deziras plu ricevi nian cirkuleron. Red.

MENDU ĈE NIA DISTRIBUEJO

Adreso:K-do.Jos.REISER,Krajská správa spojů,PLZEŇ ,Ĉeĥoslovakio:

Libroj kaj broŝuroj: Kčs

| | |
|---|---|
| E.Klimsza:Lernlibro k.aldono | 11.- |
| R.Hromada:Ĉeĥa-Esp.vortaro | 3.- |
| M.Majerová:"Urbo sub signo de fajro" | 6.- |
| Ĉinaj esp-lingvaj broŝuroj: | |
| "Por nova afero,nova maniero" | 5.- |
| "La plejforta voĉo de la paco" | 3.- |
| Saluton el ĈSR/broŝuro/ | 2.- |

Propagandiloj:

| | |
|---|---|
| Esp-insigno/rondo 13mm/verda stelo sur blanka emajlo | 3.- |
| "ESPERANTO-INFORMO"emajltabulo | 20.- |
| Gr.propag.afiŝo por kursoj | -,20 |
| Malgranda " " " | -.20 |
| Luksa foto de Esp-kongreso en Košice. | 20.- |
| Foto de Esp-kongreso-Liberec | 8.- |
| 10 Esp.pacpropag.leterpaperoj kun kovriloj kaj 1 glumarko | 2.20 |
| 10 Esp-glumarkoj | -.30 |
| 10 p.k."Esp.lingvo internacia | 1.20 |
| 10 p.k. de SAT /belkoloraj/ | 2.- |
| 10 foto p.k.de Esp-monumento en Ostrava | 6.- |
| 10 foto p.k.de d-ro Zamenhof | 3.- |
| 10 p.k."Nur antaŭen!" kanto kun muziknotoj | 2.- |
| 4 ĉinaj pacafiŝoj kun esp.kaj ĉeĥa klarigo/belkoloraj/ | 1.- |

Poŝtafrankon ni alkalkulos.

La distribuisto deziras al ĉiuj Josefoj kaj Josefinoj tre ĝojan Nomfeston kaj multajn sukcesojn!

ĈEĤA LIBRO FAVORE PRI ESPERANTO

La Slovaka Pedagogia Libroeldonejo en Bratislava aperigis lernolibron por komercaj kaj pli altaj komercaj lernejoj sub la titolo : "STENOGRAFIA III"kies aŭtoro estas Jozef Mistrík.En ĝi estas sur kelkaj lokoj mencio pri diversaj Esp. stenografioj.Al pliboniga aldono de nia k-do.Adolf Staňura estas de -diĉita speciala artikolo kun stenografiaj ekzemploj.La artikolo favore raportas pri lia verko. K-do.Adolf STAŇURA,Táborská čís.42 OSTRAVA-Radvanice,Ĉeĥoslovakio,deziras korespondadi pri stenografio kun ĉiuj landoj,speciale kun eksterEŭropaj.Li ĉiam respondos.

EPISODO EL LA VIVO DE NIA MAJSTRO

Esperantistoj ofte estas karakterizataj de arogantaj "plibonsciuloj" kiel malsaĝaj utopiistoj, revuloj aŭ kompatindaj naivuloj. Eĉ pli tia juĝo trafis en la komencaj jaroj la majstron mem.

Foje li vizitis kunvenon de kuracistoj.Enirinte la kunvenejon, li preteriris du kolegojn,kiuj estis vigle interparolantaj.Unu el ili,ekvidinte lin,alvokis lin incite."Jen nia mondpliboniğisto",Li moke diris:"Ni ĵus estis interparolantaj pri vi kaj via Esperanto.Ni demandas al ni,kio verdire vi estas:ĉu malsaĝulo aŭ kompatindulo.Kion vi mem opinias pri tio?"

Zamenhof paliĝis kaj ruĝiĝis, sed cetere li estis tre trankvila kaj tre digna.Stariĝante inter ambaŭ kolegoj,li respondis kviete kun supereca rideto: "EN ĉi tiu momento mi,kredeble, staras inter ili!"

El libro"Miru,pensu,ridu"

MEMORIGO PRI ANTONÍN DVOŘÁK

La mondsignifon de la ĉeĥa muziko aranĝis B.Smetana.Li levis la novnaskiĝantan ĉeĥan muzikon al internacia artnivoo.Jes,liaj verkoj ne ĉiam trovis malfermitan pordon en eksterlando tiel,kiel ili estus meritindaj.Sed tamen la ĉefajn verkojn de Smetana hodiaŭ jam konas la tuta mondo.Kaj fakta feliĉo de nia muziko poste estis ke la plejgranda posteulo de B. Smetana,Antonín Dvořák/1841-1904/ disvastigis la gloron de la ĉeĥa muziko tra la tuta mondo.La komponaĵoj de Dvořák entusiasmigis la aŭskultantojn,ĉar ili venis en tempo,kiam en aliaj landoj komencis la muziko submeti sin al pereigaj influoj de senvalorigo kaj dekadenco.Sed la ĉeĥa muzikisto kantis al la homoj pri la beleco de la vivo,pri la naturo,pri la plejgeniaj homaj sentoj kaj pri ĉio,kion sopiris ĉiu sincera homo.Lia muziko estis sana,komprenebla,reala kaj profunde popola. Pro tio nunjare la tuta mondo rememoros inter la 4 eminentaj jubilantoj,elektitaj de la Monda Packonsilantaro,ankaŭ pri nia glora komponisto Antonín Dvořák.

Nia Esp-rondeto en Plzeň proponis okaze de tiu ĉi festo al la loka distrikta packomitato, ke tiu ebligu la eldonon de iu fama verko de Antonín Dvořák en Esp-o kaj promesis propramanan distribuon de tia verko en la tuta mondo ,sed bedaŭrinde la packomitato al tiu ĉi iniciativa propono ĝis nun tute ne respondis. La red.

## K O R E S P O N D I   D E Z I R A S :

korespondi necesas !

Ĉe pli ol kvarlinia anonco kostas 2.-Kčs aŭ 2 intern.resp.kuponojn. Ĉiu anoncanto estas devigata almenaŭ unu foje respondi al ĉiu peto. Niaj eksterlandaj abonantoj estas petataj kontaktigi laŭ eble niajn korespondeemulojn,ĉar ankaŭ korespondado grave kontribuas al paco.

K-do.Miloslav JÍRA,Jungmanova 7, JABLONEC n/Nisou,Ĉeĥoslovakio,deziras interŝ.infandesegnojn, pri pacajn gaz.kaj let.kun junularo.

K-do.Dragan K.PALIEV,"Avgusta Tra -iana"49,STARA ZAGORA,Bulgario, kun ĉiuj landoj.

K-do.Ludvík FILIPI,ČESKÝ HERALEC, č.172,okres Hlinsko v Čechách,Ĉeĥoslovakio,pri ĉiuj temoj.

K-do.Vladimír ŠULC,Stromovka 217, CHRUDÍM,Ĉeĥoslovakio,pri literat. arto,kinematografio kaj interŝ.il. poŝtkartojn kaj gazetojn.

K-do.Václav KAŠPÁREK,/studento/ KOPŘIVNICE č.171,okr.Nový Jičín, Ĉeĥoslovakio,kun ĉ.landoj il.p.k. kaj interŝangas p.m.

K-do.Bedřich PAGÁČ,Soblahovská cesta 1044,TRENČÍN,Slov.Ĉeĥoslov. pri ĉiuj temoj per let.kaj il.p. kartoj,bele afrankitaj.

Gek-doj.el ČSR,kiuj ŝatus aboni gaz.ktp.el Polio,turnu sin al k-do.tie okupata.Adreso: Vladimír SLÁDEČEK,ČSPO, SZCZECIN,Lasztowa č.55,Polio.

K-do.Mitko SLAVOV,Ul.Benkovski 1, BOURGAS,Bulgario,interŝ.p.m.,il. p.k.,fotojn,gaz.ktp.al ĉiu resp.

K-do.György BÁLINT,Huba utc.9,sz. PÉCS,Hungario,dez.interŝ.bildkartojn kaj let.k.ĉ.l.Certe resp.

K-do.Evžen ŠPAČEK,Starobělská 22, OSTRAVA-Zábřeh,Ĉeĥoslovakio,kun Svisio,Anglio kaj Aŭstrio pri politiko,pacmovado,astrologio kaj astronomio.Certe respondas.

K-dino.Marie ŠÍSTKOVÁ u pí.Štěpánkové,Husova 192,CHRUDÍM 3,Ĉeĥoslovakio,pri literaturo,teatro kaj arto.

K-dino.Lída JELÍNKOVÁ,Rudé Armády č.32,CHRUDÍM 2,Ĉeĥoslovakio, pri ĉiuj temoj.

K-dino.Jarmila ZDEŇKOVÁ,CHRUDÍM 4 Revoluční č.489,Ĉeĥoslovakio,pri ĉiuj temoj,k.ĉ.landoj.

K-do.Jindřich ONDRÁČEK,Radyňská č.325,STARÝ PLZENEC,Ĉeĥoslovakio, pri ĉiuj temoj,p.k.il.,p.m.certe respondos al ĉiu.

K-do.Andrej VALJAN,/15j.studento/ Stalinova č.412,GALANTA,Slovakio, Ĉeĥoslov.kun ĉiuj landoj per il. p.k.,interŝ.p.m.

K-do.Giso BROSCHE,Postweg No.87, PIRNA/Elbe,D.D.R.Germanio,kun ĉ. landoj pri pacmovado ktp.

SVEDA LABORISTA ESPERANTO ASOCIO, Barnhusgatan 8,STOKHOLM, Svedio, arangos en la Junulardomo de urbo Stokholm de 28/4-12/5.grandan ekspozicion de infandesegnaĵoj sub la moto:"Laboro kaj festoj en nia regiono".Sendu abunde konvenan materialon.

K-do.Zdeněk CHLEBEK,Vaníčkova 38, OPAVA-Kylešovice,Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj.Certe respondos.

K-do.Emilo KLIMSZA,DOLNÍ SUCHÁ 2 okres Karviná,Ĉeĥosl.sendos al vi propag.flugfolion"CO JE ESPERANTO" po 20 hel.kaj poŝtkarton po 10 h. Por eksterl.4 flugfolioj-1 resp.k. 7 poŝtkartoj - 1 resp.kuponon.

### A L V O K O

Ni intencas reorganizi la esperanto movadon en Slovakio.Jam en multaj lokoj intensive laboras kelkaj grupoj sub gvido de aktivaj gek-doj.Por akiri kontakton kaj plifaciligi nian laboron estas necesa,aligi kaj sendi ĉiujn adresojn de slov.esp-istoj al k-do.Milan NEUBELER,POPRAD 4.Slov.

### NI ŜERĈAS PERANTOJN

ankoraŭ por la urboj OSTRAVA, LIBEREC,BUDĚJOVICE,HRAD.KRÁLOVÉ, LANŠKROUN kaj KOPŘIVNICE.

La tasko de tiuj perantoj estas: distribui nian organon al la lokaj abonantoj,inkasi la abonkotizon,arangi informkunvenojn kaj raporti al nia redakcio pri la loka Esp.movado. Aligu baldaŭ!

Eldonis: OSVETOVÁ BESEDA,OSTRAVA-ZÁBŘEH,ODBOR ESPERANTO„KOMENSKÝ"
Redaktis: K-do.Rudolf BURDA, Palackého náměstí č.6 , P L Z E Ň .
Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O